

ĀEHOSLOVAKA
ESPERANTO
REVUO

JARO XIV. NRO 5.
MAJO 1932.
APERIS 10. V. 1932.

la progreso



OFICIALA ORGANO DE ĀEHOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
REDAKCIO, KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHARSKÁ 333

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.—; fremdlando Kĉ 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-
lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ŝparkaso Praha: N-ro 34.271.

SLAVNĪ MUŤOVĒ ĀESKOSLOVENŤTĪ A ESPERANTO.

KdyŹ naŝe hnutĪ zaĉĪnalo, bylo poklādano vĉtŝinou za utopistickĉ a zcela mimo okruh tehdeŝĪho vĉdeckĉho zājmu. Proto byla mu velmi vĪtána slova uznānĪ od kohokoli, kdo vynĪkl v nĉkterĉm oboru veveĵnĉ ĉinnostĪ. NynĪ je postoj hnutĪ k oficielnĪm autoritām podstatnĉ zmĉnĉn. Teoretickĵ souhlas nenĪ zvlāŝnostĪ, spĪŝe je pravidlem. Je nāmĪ cenĉn, ale nenĪ pĉceĉovān. Dodāvame souĉasnĉ civilisaci kladnĵ prvek, jsme v ni vĉlenĉnĪ jako jedna ze samostatnĵ sloŝek, jejiŹ hodnota plyne z ni samĉ. Proto je na mĪstĉ zaznamenati Ī hlasy slavnĵ muŹĵ, které byly nām nepĪznĪvĉ.

KdyŹ jsme zaĉali r. 1908 s H. K. Bouŝkou redigovati Āeskĉho esperantistu, snaŹili jsme se zĪskati pro obnovou revuĪ pĪspěvkĵ Ī z řad vynĪkajĪcĪch vĉdcĵ. Ūspěch mĉl Bouŝka jedĪnĉ u Frantiŝka KrejĉĪho. Racionalistickĵ pozitivista dovedl bĪtĪ dĪslednĵ Ī v otāzce esperantismu a dodal nām uŹ pro ĉĪslo ze zāĪĪ 1909 ĉlānek Vĵznam esperantismu ve vĵvoji kulturnĪm, kterĵ Ī dnes je pozoruhodnĵ. DruzĪ dva ze slavnĉ trojice myslitelĵ tehdy vedoucĪch mlādeŹ Masaryk a DrtĪna projevĪli v rozhovorech sympatie s naŝĪm hnutĪm, ale ĉlānku nebo pĪsemnĉho projevu nevydali. BĉetĪslava Foustku, slavnĉho tehdy sociologa a jednoho z prvĵch propagatorĵ abstĪnentismu navŝtĪvĪli jsme jā a Bouŝka v bytĉ s prosbou o ĉlānek. SlĪboval velmi vāŹnĉ vyhovĉtĪ prosbĉ uĉtĪvĵch mladĪkĵ, ale nevyhovĉl. Otakar Kādner, proslulĵ pedagog, kterĉho jsme na jakĉsĪ schĵzĪ pĉmluvĪli, aby se prohlāsĪl pro naŝe hnutĪ, vyhovĉl tak, Źe napsal do NaŝĪ doby r. 1910 sympatickĵ referāt o naŝem pĉkladu „Ūvahy o jazyce mezinārodnĪm.“

Vyslovenĵ nepĪtel esperanta byl tehdy Arnoŝt

Kraus, vynĪkajĪcĪ germanĪsta. Vedle svĉ germanistiky mĉl jeŝtĉ jednu lāsku: Dānsko. JezdĪval tam na prāzdniny, nauĉĪl se dānsky a propagoval dānskou zemĉdĉlskou kulturu. LĪĉil pĉsvĉdĉivĉ, jak dānŝtĪ zemĉdĉlcĪ do bĉe dovedou zorganizovati svou prāci tak, Źe ji majĪ mnohem ĉistŝĪ a vĵnosnĉjŝĪ neŹ naŝĪ. Do tĉ strānce zdā se, Źe pĉchānĉl. Do pĉevratu dostĪ naŝĪch zāmoŹnĉjŝĪch zemĉdĉlskĵch synĵ ŝlo do Dānska na zkuŝenou a jak jejich referāty ve Venkovĉ a jinde ukazujĪ, byli rozĉarovānĪ prāvĉ v oĉekāvānĪ tĉ pohodlnostĪ zemĉdĉlskĉ prāce v Dānsku. Profesor Kraus byl tehdy do Dānska tak zamĪlovān, Źe r. 1908 v pĉednāŝce v Źenskĉm klubu prohlašoval, Źe Ī dānŝtinĉ se uĉĪtĪ je uĉelnĉjŝĪ neŹ esperantu. Kraus postavĪl se proti esperantu nĉkolĪkrāte slovem Ī pĪsmem, ironisuje Ī vyklādaje. Nikdy vŝak se nām nepodaĪilo vystoupĪtĪ proti nĉmu ĉlānkem aĹ vĵbojnĵm aĹ obrannĵm. Jednak pĉekāŹela tomu obecnā Ūĉta, jĪŹ se proslulĵ germanĪsta tĉŝĪl a tĉŝĪ jako vĉdec Ī jako ĉlovĉk Ī u nās. Jednak bylo Īze tĉŹko najĪtĪ vhodnou tribunu.

Ostatnĉ Ī postoj Krausĵv byl nām tehdy sympaticĉtĉjŝĪ neŹ postoj vĉtŝĪny tehdeŝĪho uĉennĉho a odbornĉho svĉta. Ten byl: naprostĵ nezājem.

Jak se zmĉnil tento postoj za dobu ne tak dlouhou, ukāzalo se roku 1921, kdy se obrātĪl naŝ Svaz na řadu veveĵnĉ ĉinnĵch muŹĵ s prosbou, aby naŝe hnutĪ mravnĉ podporovali pĪhlāŝkou do naŝĉho ĉestnĉho vĵboru. PĪhlāsĪlo se jich vĪce neŹ 70 z nejruŹnĉjŝĪch oborĵ ĉinnostĪ.

Je jen pĪrozeno, Źe s ĉastostĪ souhlasu roste Ī ĉastost nesouhlasu. NejzāvāŹnĉjŝĪ a nejupĪm-

nější námitku slyšel jsem od profesora Josefa Šusty. Řekl jí hned v odpovědi na moje slova, jimiž jsem ho vítal jako čestného předsedu a zástupce vlády na našem mezinárodním sjezdu v Praze. Proti mému tvrzení, že naděje na úspěch esperanta je podložena mohutností racionalistické složky dnešní civilizace, namítl hluboký znalec dějin a zároveň nadprůměrný mistr umění slovesného ve své zdvořile improvizované odpovědi, zda složka tradiční není mocnější než racionalistická, jmenovitě jde-li o problém jazykový. V korespondenci, kterou mne tehdejší ministr počtil, slíbil zvědavý badatel, že myšlenku tu rozvede ve zvláštním článku. Myslím, že dosud ho nenapsal. Lituji toho velice, neboť jeho námitka zasloužila by si rozboru podrobného, a je dosud aktuální. Avšak zvážiti ji mohou výhradně esperantisté.

Neboť stěží najdou se lepší odborníci v otázce pomocného mezinárodního jazyka než odborníci naši. Empirismus esperantistické teorie má všechny znaky vědecké metody. Proto mne v nedávném článku o novém projektu mezinárodního jazyka Basic English od autora tak školního jako je dr. Vočadlo nejvíce překvapilo, že výbornost nového jazyka chce odůvodňovat tím, že na něm pracoval „ortologický“ ústav Cambridžské university. Nechtě je nový ústav jmenován jakkoli, nechtě je vyzbrojen sebe lepšími znalci filologickými, ničím nemůže nahraditi právě zkušenost esperantistů v oboru umělého jazyka. Je to zkušenost, která má oba znaky zkušenosti vědecky upotřebitelné: dosažitelnou úplnost a citovou nezáujatost.

Stan. Kamaryt.

Jan Neruda:

LI ESTIS SENTAŬGULO!

El „Arabesky“, 1864.

Horáček jam mortis! Neniu bedaŭras lian morton, oni ja konis lin en la tuta Malgranda kvartalo de Praha. En tio ĉi kvartalo oni konas sin reciproke, eble tial, ke tie ĉi oni ne konas aliajn homojn, kaj kiam Horáček mortis, oni diris, estas bone, ĉar per tio lia bona patrino senŝarĝiĝos, kaj plue ke „li estis sentaŭgulo.“

Li mortis en sia dudekkvina jaro subite, kiel oni diris la listo de mortintoj; la karaktero ne estis en la listo skribita, ĉar „sentaŭgulo havas nenian karakteron“, kiel sprite diris sinjoro apotekeŝtro. Certe, se sinjoro apotekeŝtro estus la mortinto, estus tute alia afero! Pri li neniu sciis ion malbonan!

La kadavro de Horáček estis kun aliaj kadavroj elveturigita el la komuna kapelo — „kia vivo, tia fino,“ diris sinjoro apoteka ĉefo — kaj la veturilon sekvis malgranda aro da almozuloj, iomete solene vestitaj, kies mizero tiom pli estis videbla. En la areto apartenis al la akompanantoj de Horáček sole du personoj, la maljuna patrino kaj tre elegante vestita juna sinjoro ŝin apoganta. Tiu ĉi estis pala, lia irado iel tremanta kaj malcerta, eĉ ŝajnis, ke de tempo al tempo li febre ekskuŝiĝis.

La loĝantoj de Malá Strana ne tro atentis la plorantan patrineton, ŝi senŝarĝiĝis ja, kaj se ŝi ploris, do sole kiel la patrino aŭ eble por ĝojo; sed la juna sinjoro estis verŝajne el alia kvartalo, ĉar neniu lin konis.

„Kompatindulo, li mem bezonus esti apogata! Li iras tre verŝajne pro simpatio al la patrino!“ „Kiel? lia amiko?“ „Kiu konfesus amikecon al la senhonorito! kaj krome, Horáček jam de la infaneco havis neniun amikon, li ĉiam estis sentaŭgulo! — Kompatinda patrino!“ — Kaj la patrino dumire ploregis, al la junulo ĝutis grandaj larmoj sur la vangoj, malgraŭ tio, ke Horáček jam de la infaneco estis sentaŭgulo.

La gepatroj de Horáček havis nutraĵvendejon. Ili fartis bone, kiel ĉiuj similaj vendistoj havantaj la vendejon en malriĉa kvartalo. Certe malrapide kolektiĝas krejceroj kaj groŝoj por venditaj ligno, butero kaj graso, precipe se oni devas senpage aldoni iomete da salo aŭ da kumino; sed tamen venas groŝo kontanta kaj oni povas pagi ŝuldojn dugroŝajn. Horáčekova havis favorantinojn eĉ inter edzinoj de oficistoj, kiuj laŭdis ŝian bonan buteron. Ili prenis multe da ĝi, ĉar ili pagis nur je la unua de la monato.

Ilia knabo Franĉjo estis jam preskaŭ trijara kaj li estis ankoraŭ knabine vestata. La najbarinoj diradis, ke li estas malbela infano. Infanoj de la naj-

baroj estis ĉiuj pli aĝaj kaj Franĉjo malofte kuraĝis ludi kun ili. Foje Fraĉjo estis inter ili kaj silentis, kiam ili vokis mokojn al judo; la judo persekutis la infanojn, kaptis Franĉjon, kiu eĉ ne intencis kuri, kaj kondukis lin al la gepatroj insultante. La najbarinoj rigidigis pro miro, kia sentaŭgulo tiu malgranda, malbela Franĉjo jam estas.

La patrino ektimis kaj interkonsilis kun sia edzo.

„Mi ne batos lin, sed hejme li inter infanoj sovaĝiĝus, ĉar mi ne povas lin gardi, ni do donos lin en infanvartejon!“

Franĉjo ricevis pantalonon kaj plorante iris en la infanejon. Li sidis tie du jarojn. La unuan jaron li ricevis kiel rekompencan pro sia frankvilemo kornobulkon, la duan jaron li estus ricevinta bildeton, se tio ne estus malsukcesinta. Tagon antaŭ la ekzameno li iris tagmeze hejmen. Li devis iri preter domo de riĉa bienposedanto. Antaŭ la domo sur sufiĉe trankvila strato kuradis kortbirdaro kaj Franĉjo ofte kun ĝi kore ĝojigis. Hodiaŭ tie promenis kelke da meleagrinoj, kiujn Franĉjo ankoraŭ neniam vidis. Li haltis kaj rigardis ilin en ekstazo. Ne daŭris longe kaj jam li sidis kaŭre inter ili kaj havis kun ili gravan interparolon. Li forgesis pri la tagmanĝo kaj la lernejo kaj kiam la infanoj posttagmeze plendis kontraŭ li, ke li ludas kun kortbirdaro anstataŭ iri en la lernejon, sinjoro instruisto sendis servistinon, ke ŝi alkonduku lin. Dum la ekzameno Franĉjo ricevis nenion kaj sinjoro instruisto diris al lia patrino, ke ŝi pli severe eduku lin, ke jam nun li estas kompleta sentaŭgulo.

Kaj vere Franĉjo estis notinda sentaŭgulo! En la paroĥa lernejo li sidis apud fileto de sinjoro inspektoro kaj iradis kun li manon en mano hejmen. Ili ludis ĉe gesinjoroj inspektoroj. Al Franĉjo estis permesite luli la plej junan infanon kaj li ricevis por tio en blanka poteto kafon. La fileto de sinjoro inspektoro havis ĉiam belan veston kun blanka forte amelita kolumo, Franĉjo havis puran, sed sufiĉe flikitan veston; cetere li eĉ ne pripensis, ke li estas alie vestita ol la filo de inspektoro. Foje post la instruado haltis sinjoro instruisto ĉe ambaŭ knaboj karesis la fileton de sin-

joro inspektoro kaj diris: „Vidu, Konrado, kiel bela knabo vi estas, ĉar vi scias gardi vian kolumon kontraŭ malpuraĵo! Diru, ke mi salutas sinjoron la patron!“

„Jes“, respondis Franĉjo.

„Kun vi mi ne parolas, flikitulo!“

Franĉjo ne tuj komprenis, kial pro flikita vesto sinjoro instruisto ne povas saluti lian patron; li suspektis tamen iun diferencon inter si kaj la filo de inspektoro kaj donis al li multajn batojn. Kiel ne plibonigebla sentaŭgulo li estis elpelita.

La gepatroj donis lin en germanan lernejon. Fraĉjo komprenis preskaŭ ne niun vorton germanan kaj sekve li tre mizere progresis en la lernado. La instruistoj rigardis lin maldiligenta, kvankam li sufiĉe klopodis, ili konsideris lin senmora, ĉar li ĉiam defendis sin, kiam la knaboj lin incitis kaj li ne sciis respondi germane pri siaj interbatiĝoj. Kaj knaboj trovis vere sufiĉe da aferoj por inciti lin. Ĉiumomente li fariĝis ridinda per malbona elparolo de germana lingvo kaj ankaŭ alie li donis okazon por esti mokata. Sed plej grandan plezuron havis la knaboj foje, kiam li venis en la lernejon havante sur sia verda, kukoforma ĉapo ŝirmilon, dikan je unu fingro kaj horizontale fiksitajn. Lia patro speciale iris en la Malnovan kvartalon, por aĉeti ion ne ordinaran. „Tio ne rompiĝos kaj la suno ne tiom brunigos vin“, diris li alkudrante la ŝirmilon kaj Fraĉjo vere opiniis, ke li havas ion speciale ornaman kaj marŝis fiere en la lernejon. Senfina rido lin bonvenigis, la knaboj saltis ĉirkaŭ li kaj ĉar lia ŝirmilo inter la aliaj ŝirmiloj estis kiel dika ligna tabulego inter tabuletoj oni lin nomis: „tabulegulo“. Fraĉjo disbatis per sia „tabulego“ al unu el ili la nazon, li ricevis malbonan noton pri konduto kaj li devis multe peni, ke oni lin akceptu en la gimnazion.

La gepatroj klopodis per ĉiuj fortoj, ke el ilia fileto fariĝu iu, kiu ne bezonu tiel malfacile labori por si pano kiel ili. La instruistoj kaj najbaroj malkonsilis tion al ili dirante, ke li ne havas kapablecon kaj ke plie li estas sentaŭgulo. Jes eĉ ĉe la najbaroj li havis tiun ĉi renomon. Li havis kun ili specialan malŝancon, kvankam vere li ne faris pji

ol iliaj infanoj, eĉ eble malpli. Kiam ajn li ludis pilkon sur la strato, la pilko certe enflugis en fremdan fenestron, kaj kiam li en veturkoridoro ludis „ŝtipeton“ kun siaj kamaradoj, certe li rompis lampeton sub la krucifikso, kvankam li kondukis plej atente.

Franĉjo, kiun oni nun jam nomis Horáček, studis tamen la gimnazion. Oni ne povas diri, ke li kun troa diligenteco amas la studadon, tiu jam en la germana lernejo fariĝis nesimpatia al li kaj liaj ĝeneralaj progresoj estis sole tiaj, ke li de jaro al jaro sen grandaj malfacilaĵoj absolvis la klasojn; sed tiom pli multe Horáček lernis tion, kio ne necese apartenis al la instruado. Li legis tre diligente ĉion, kio venis en liajn manojn kaj li ekkonis tre baldaŭ sufiĉe funde fremdajn literaturojn. Lia germana stilo estis baldaŭ perfekta — sola bonega noto neniam lin forlasinta en la gimnazio — li havis en siaj taskoj belajn pensojn kaj frazojn. Lia instruisto certigis foje, ke li havas fian esprimriĉan stilon, kiu similas al la stilo de Herder! Oni lin indulgis, se li en ceteraj objektoj ne multe sukcesis, diris ke li havas talenton, sed estas sentaŭgulo. Sed la talenton ruinigi ili ne kuraĝis kaj Horáček traĝitis ankaŭ la lastan ekzamenon.

Li fariĝis juristo laŭ modo kaj tial, ke lia parto volis, ke li estu oficisto. Horáček havis nun ankoraŭ pli multe da tempo por legi, kaj ĉar li estis samtempe feliĉe enamiĝinta, li komencis mem skribi. Liajn unuajn provojn presis gazetoj kaj la tuta Malgranda kvartalo estis senmezure indignita, ke li fariĝis literaturisto kaj ke li verkas por gazetoj kaj al tio por la ĉeflingvaj. Oni antaŭdiris, ke nun li rapide degeneriĝos kaj kiam post nelonga tempo lia patro mortis, oni sciis kun certeco ke lin mortigis turmento pro la filo sentaŭgulo.

La patrino forlasis la vendejon. Post mallonga tempo ili fartis mizere kaj Horáček devis zorgi, ke li ion enspezu. Instrui li ne sciis kaj ankaŭ neniu lin volis akcepti kiel hejminstruiston. Li ŝatus ricevi iun postenon, sed li ne estis tuj preta ĝin serĉi. La emo al studoj ja ne malhelpis lin, la juroscienco estis sufiĉe malbongusta nutraĵo kaj la ko-

legion li vizitis nur se li enuis. Komenkante la jurostudojn li decidis skribi unu epigramon en ĉiu leciono, kiun li vizitos kaj kiam li pripensis forlasi la studojn, li kalkulis la epigramojn kaj ili estis ok.

La ĉefa malhelpaĵo estis lia amo. Knabino beleĝa kaj vere ĉarma ekflamis en pura amo al li kaj ŝiaj gepatroj ne trudis al ŝi iun alian, kvankam multaj fianĉoj anoncis sin. La knabino volis atendi, ĝis Horáček estus preta kun la studoj kaj ricevus iun bonan postenon. Ĉe deĵoro, kiun li povis tuj ricevi, estis ja tuja salajro sed neniu espero por la estonteco. Horáček sciis bone ke la knabino havus kun li neniam bonajn ŝancojn kaj oferi ŝin al la mizero li ne volis. Li opiniis, ke li malpli multe ŝin amas ol li vere ŝin amis kaj decidis do forlasi ŝin. Sed por simple ŝin forlasi li ne havis kuraĝon, li volis esti rifuzita, forpuŝita; tio estis senkonscia sopiro trovi plezuron en la nemeritita doloro. Baldaŭ li elpensis rimedon. Li skribis anoniman leteron, li aliformis skribon,, li rakontis pri si mem la plej malhonestajn aferojn kaj sendis tion al la gepatroj de sia knabino. La filineto ne kredis al la denuncanto, sed antaŭzorgema patro demandis ĉe najbaroj de Horáček kaj tie li aŭdis, ke Horáček estas jam de infaneco sentaŭgulo. Kiam Horáček post kelke da tagoj venis je vizito, forkuris la ploranta knabino en alian ĉambron kaj li mem estis ĝentile elpelita el la domo. La knabineto post mallonga tempo edziniĝis kaj tra la kvartalo kutis sciigo, ke Horáček estis pro tio elpelita, ke li estas sentaŭgulo.

Nur nun la koro de Horáček estis krevanta; li ia perdis la solan personon, ĉe kiu li estis trovinta amon kaj li ne povis malkonfesi la propran kulpon. Li perdis sian kuraĝon, lia nova okupo ekmalplaĉis al li kaj li videble suferis kaj kadukiĝis. Liaj najbaroj neniel miris pro tio dirante, ke tio estas sekvo de malserioza vivo.

Lia nuna okupo ligis lin al privata kontoro. Malgraŭ sia antipatio li laboris diligente kaj lia estro baldaŭ plene lin fidis; eĉ monon li konfidis al li. Li havis ankaŭ okazon plaĉigi sin al la filo de sia estro. Foje tiu ĉi atendis lin ĝuste, kiam li estis foriranta.

„Sinjoro Horáček, se ne helpos vi, mi devas dronigi min kaj al mia patro fari skandalon por eviti mian propran. Mi havas ŝuldon, kiun tuj hodiaŭ mi nepre devas pagi. Mian monon mi ricevos nur postmorgaŭ kaj hodiaŭ mi estas senkonsila. Vi portas monon al mia onklo — konfidu ĝin dume al mi, postmorgaŭ ĉio estos ordigita. La onklo ne demandas la patron pri la mono!“

Sed la onklo tamen demandis kaj la sekvintan tagon sciigis la gazetoj: „Mi petas ĉiujn, kiuj rilatas kun mi, ke ili al F. Horáček neniun monon konfidu! Mi elpelis lin pro malhonesteco“. — Eĉ sciigo, ke en alia kvartalo estas brulego ne interesus la loĝantojn de Malgranda kvartalo tiom, kiom tiu ĉi sciigo.

Horáček ne perfidis la filon de sia estro; li venis hejmen kaj kuŝiĝis pretekstante, ke li sentas kapdoloron.

La distrikta kuracisto por malriĉuloj venis la sekvintan tagon en la apotekon je kutima horo iel enpensite.

„Tiu sentaŭgulo do mortis?“, demandis sinjoro apotekestro ridetante.

„Horáček? — Nu jes!“

Kaj per kio li finis?

„Nu — ni skribos — ke per apopleksio.“

„Jen!“ — Bone, ke li ne faris ŝuldojn por medikamentoj, — tiu sentaŭgulo!“

Trad. B. Hofmannová (Praha).

Mistero de sciencula laborejo.

Scienculon Koch vizitis en lia laborĉambro unu el liaj amikoj kaj trovis lin inter mikroskopoj kaj aparatoj kaj reagiloj ĉe la eksperimenta tablo, klini sin super vitra vazeto, starigita sur lungasa flamingo. En la vazeto estis ia fluidaĵo. Koch preterpase donis al la amiko kubuton kaj atentege studis la staton de la fluidaĵo en la vazo, tenante en la mano ian paketon. En la tuta atmosfero, en la tuta konduto de la scienculo estis io solene streĉa.

„Kion vi kuiras?“ demandis la amiko — „ĉu ĉiun novan grundon por bakterioj?“

„Ne“, apenaŭ respondis Koch.

„Do ia kemia elfrovaĵo?“

„Ne!“

„Vi streĉas min“ — insistis la amiko. — „Kiu scienca sekreto estas do en la vazeto kaj en la paketo?“

„En la vazo estas akvo“ — rediris Koch ne turnante de la vazo la okulojn, „kaj en la paketo

mi havas du parojn da kolbasetoj; mi volas ilin varmigi por tagmanĝo.“ (Ĉin)

Tajloroj de Praha.

— La mortinta granda aktoro Rudolf Schildkraut, patro de la konata filmaktoro Josef Sch., kudrigadis siajn vestojn en Praha. Pro du kaŭzoj: unue, la tajloroj de Praha laboras malkare, due, ili laboras bonege; ili tion scias kaj estas pro tio tre memfidaj. — Iun tagon, kiam Sch. estis gasto en Praha, li mendis pantalonon: „Ĝi devas esti preta en ok tagoj, ĉar poste mi forvojaĝas.“ — Pasis la ok tagoj, sed la pantalone nenie. Sch. devis forvojaĝi, skribis do al la tajloro. Neniu respondo. — Post du jaroj Sch. ree venis al Praha. En la tago de lia alveno aperis la tajloro kun zorge gladita pantalone sur la brako. „Ĉu vi volas min trakti kiel frenezulon?“ ekkriis Sch. „Dio mem bezonis sole ses tagojn por krei la mondon kaj vi bezonis du jarojn por fari pantalonon!“ La tajloro respondis fiere: „Sed rigardu la mondon kaj rigardu, kiaj pantalonoj...!“

Ridu.

— Mi dankas al vi por la donaco, onklo. — Nu bone, ne valoras ja paroli pri tio. — Tion mi ankaŭ diris, sed la patrino ordonis, ke mi tamen danku.

— Sciu, fraŭlino, la boksado estas grandioza sporto. — Ĉu vere? Ĉu vi estas boksisto? — Ne, dentisto.

EL ESPERANTO-MONDO

24. Kongreso de Esperanto en Paris

30. Julio — 6. Aŭgusto 1932.

Nova adreso:

La Maison de la Mutualité, 24,
rue Saint-Victor Paris -V.

Atentu la novan adreson de la Sekretariejo. Kompreneble leteroj jam senditaj al la malnova adreso estas regule transsendataj al la nova sekretariejo.

Poŝtajn ĉekojn adresu al „XXIVe Congrès Universel d' Esperanto, Paris 1647-59“.

Bankaj ĉekoj estu pagataj al la „XXIVe Congrès Universel de Esperanto“ konto 10.066 Agence HV, Société Générale, Paris.

Ekskursoj tra Parizo en aŭtomobilegoj: Paris matene 15 fr, Paris posttagmeze 15 fr. (20 Kĉ), vizito de ĉefaj monumentoj kaj interesajoj de la urbo. Ekskurso al Versailles

per specialaj vagonaroj, por 15 fr, ekskurso al Fontainebleau per aŭtomobilegoj 42 fr. (tuttaga). La ĉi supraj prezoj enhavas ĉiujn elspezojn, inkluzive de enirpagoj kaj trinkmonoj. Por ĉiu ekskurso LKK organizos stabon de kompetentaj esp. gvidistoj.

Por karavanoj kaj aliaj kongresanoj vojaĝantaj multope, la LKK aranĝos transporton el la alvena stacidomo ĝis la Kongresejo, kaj laŭeble de la Kongresejo ĝis la hoteloj; la prezo estas 4 fr po persono.

Gvidlibron pri Parizo donacos LKK al ĉiu kongresano.

Teatraĵo prezentota estas la mondfama franca komedio *Knock* de Jules Romains ludota de esp. aktoroj jam famaj en niaj kongresoj. La tekston eldonos malmultekoste La Centra Librejo Esp. en Paris.

Aliĝis ĝis nun 301 kongresanoj el 17 landoj, inter ili Francujo 180, Granda Britlando 22, Belgio 22, Germanio 15, Nederlando 16, Ĉeĥoslovakio 5, Pollando 12, Rumanio 1.

La gazeto de la XXIV-a alportas en sia 4-a n-ro ree interesan enhavon, ekz. Vivado en Parizo, Babilajoj pri Parizo, Parizo (de Teo Jung), Franca gazetaro, k. a.

Oportuna vojaĝo al la XXIV-a tra Praha.

La Fervoja Direkcio en Praha ekspedos laŭ interkonsento kun Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista specialan vagonaron el Praha al Parizo por alte rabatita prezo. Se tion dezirus plimulto de la interesatoj, la vagonaro foriros unu semajnon antaŭ la komenco de la kongreso kaj ebligos viziton de multegaj Parizaj vidindaĵoj kaj ankaŭ de aliaj francaj lokoj.

Kongresanoj vojaĝantaj unuope al Parizo tra Ĉeĥoslovakio ricevos 33% rabaton sur ĉeĥoslovakaj fervojoj, uzontoj de speciala vagonaro havos el Praha rabaton ankoraŭ pli altan. Samaj rabatoj validas por la revojaĝo.

Partoprenantoj en la komuna vojaĝo ricevos ankaŭ loĝadon kaj eventuale ankaŭ manĝon en Parizo, dum la antaŭkongresa semajno ankaŭ la gvidadon.

Skribu kun almetita responda afranko al Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, Urálské nám. 447, Praha XIX:

- 1.) tra kiu limstacio vi eniros en Ĉeĥoslovakion kaj tra kiu stacio vi eliros (la necesan oficialan rabatifilon ni sendas afrankite por 3 respondkuponoj),
- 2.) ĉu vi preferas daŭron de la vojaĝo de la 23. VII. ĝis 7. VIII. aŭ de la 30. VII. ĝis 7. VIII.

Ĉiu demandinto ricevos ĝustatempe informon pri definitiva aranĝo.

Kosto de dusemajna vojaĝo (rapidvagonara veturo el Praha kaj reen, loĝado kaj manĝo dum la tuta daŭro, dum antaŭkongresa semajno ankaŭ gvidado) estas Kĉ 1800 aŭ 54 usonaj dolaroj.

* * *

Laŭ „Amerika Esperantisto“ (Nov. - Dec. 1931) granda vortaro de ĉiuj teknikaj vortoj pri aviado, navigacio kaj geologio estas nun verkita de Sovet-Esperanto-Unio en Moskvo, kun kunlaboro de multaj sciencistoj de aliaj nacioj. La volumo entenos 1000 paĝojn kaj estos publikigitaj 50.000 ekz. dank' al financa helpo de la registaro.

Juristan vortaron germana-esperantan publikigis D-ro S. Liebeck en Berlin.

Universala Terminaro de Arkitekturo verkita de hispana samideano F. Azorin, aperas kiel aldono al Hispana Esperanto-Gazeto. Ĉiu termino estas akompanata de bildo (estos 2000 desegnoj), de traduko en 6 lingvoj kaj de klarigo en esperanto.

Laŭ la „Suda Kruco“ sole du personoj en la mondo posedas la tutan kolekton de la unua esperanta gazeto „La Esperantisto“: S-ro. Bailey en Manchester, kaj S-ro E. de Wahl en Tallin. Ing. Eug. Wüster en Wieselburg (Aŭstrio) havas la kolekton, krom la n-ro 11 (1890).

Pri G. E. L.

Antaŭ la kongreso de Olomouc ni trovas utila publikigi kelkajn informojn pri la stato kaj agado de G. E. L., Germana Esperanto-Ligo en CSR, la propaganda centro de niaj germanaj samlandanoj.

La Germana E-Ligo havis sian jarkunveno en la 6. Marto 1932 en Haida (Bor u České Lípy). Re prezentitaj estis 11 grupoj. El la raporto pri agado, prezentita de la Ligo prezidanto Ing. Scholze ni citas:

La membra sliparo de GEL enhavis fine de 1931 entute 2121 nomojn. El tiuj estis fine de 1931 paĝintaj membroj 431, kiuj apartenas al 28 grupoj. La membraro vivas en 80 lokoj.

Oficiala instruado en germanaj lernejoj dum 1931-32; burĝaj lernejoj por knaboj: Podmokly, Přivoz, Trnovany; burĝa lernejo por knabinoj: Ústí n. L.; komerca lernejo: Wertheim en Praha. Du kursoj por lernantoj en la I. Germana ŝtata reallernejo en Praha. Germana Teknika Altlernejo en Praha. Blindulejo Klar en Praha, Germana ŝtata metia lernejo en Liberec, Hotelfaka lernejo en Mariánské Lázně.

Propagando: Dum la Esperantosemajno la grupoj varbis diversmaniere laŭ lokaj cirkonstancoj aŭ faris nenion. La Ligo organizis ankaŭ

propagandan vojaĝon de la ICK-delegito s-ro Scherer, kiu parolis en Aŝ, Mariánské Lázně, Praha, Vrchlabí, Liberec, Litoměřice, Teplice, Plzeň, Moravská Ostrava, Český Těšín. La sukceso estis ĉie tre kontentiga. La grupo Liberec propagandis kiel ĉiujare dum la Foirá semajno. Apud la urbodomo staris triangula varba kolono, kiu multe efikis: „Jedermann lerne die Welthilfssprache Esperanto“. Horloĝo montris, ke estas urĝa tempo fari ĝin. Supre flirtis esperantoflago. La semaforo „Bahnhof für Esperanto“ estis renovigita kaj ree starigita. Stando kun turismaj kaj foiraj esperantolingvaj varbiloj vekis multan intereson.

Laŭ financa raporto la aktivoj de GEL estas Kč 8,574.80, la pasivoj Kč 2,356.40, la neta havaĵo Kč 6,218.40.

La ĉefkunveno unuanime decidis konservi la ĝisnunan kotizon t. e. Kč 24.— plus Kč 2.— por K. R.; ĉi tiu kotizo enhavas la liveradon de „Marto“.

Nova estraro: Por la daŭro de 2 jaroj estas nove elektitaj: 1-a prezidanto Ing. Gustav Scholze, profesoro en Liberec; 2-a prezidanto Rudolf Horn, direktoro de ŝparkaso en Krnov, 3-a prezidanto Hans Klinger, ĉefrevidento en Podmokly; 1-a kasisto: Marianne König, korespondistino; 2-a kasisto Maria Kristen, instruistino, 1-a sekretario Karl Schüller, kasisto, 2-a sekr. Fritz Michálek, komercisto, 3-a sekr. Rudolf Rössel, oficisto de ŝparkaso, ĉiuj kvin en Liberec.

La ĉefkunveno decidis daŭrigi la kontrakton pri la Liga organo „Marto“. Al plendintoj estas ripetite dirata, ke nericevintoj de la gazeto Marto unue konstata, ĉu la kotizo estas ĝustatempe antaŭpagita kaj due nepre reklamaciŭ per senafranka „gazeta reklamaciŭlo.“

La ĉefkunveno decidis prezenti 6 punktojn por la programo de la Kvina kongreso en Olomouc.

(Laŭ „Marto“.)

Instruistoj en CSR legu!

La Delegito por Eksterlando de Itala Esperanto-Movado estas kolektanto de rezultoj akireblaj per korespondado esperantolingva inter gelnantoj de mezgradaj kaj superaj lernejoj el la tuta mondo rilatantaj ĝeneralan kulturon (sciencojn, historion, geografion, pedagogion, manlaborojn, k. t. p.)

La rezultoj de l'enketo celas propagandi por Esperanto, precipe ĉe altrangaj oficialaj instruistoj rondo, montrante al neesperantistoj la grandan pedagogian valoron de l'internacia helpla lingvo por ĉia kulturo.

Geinstruistoj de Esperanto bonvolu skribi pri siaj spertoj en interlerneja korespondado al la „Delegito por Eksterlando de Itala Esperanto Movado“: Prof. Gaetano Facchi al la adreso de lia oficejo: Esperanto Centro- Galleria V. E., 92.—Milano, aŭ al lia persona adreso: Corso V. E. 64—Brescia.

Ĉeské klíče esp.

V zájmu zvýšení propagandy usnesl se Č. E. Ústav (institut) na své valné hromadě na zlevnění svých esperantských klíčů pro čs. esperantské organizace, redakce a podniky, jejich funkcionáře (delegáty UEA) resp. majitele, zašlou-li předem složenkou pošt. spořitelny čís. 33554 Praha Čs, esper. ústav (Institut) obnos 40 Kč resp. 20 Kč za 100 resp. 50 klíčů. V drobném stojí kus 60 h, což je 1 prodejní cenou.

LINGVA FAKO

NAŠE TEXTY K PŘEKLADU.

Uveřejňujeme dnes překlady textů 31. a 32. Oba texty přeložili a svoje práce nám zaslali: Baculík Jan, Zv. Slatina, Dočkal F., Opava, Doubek A. H. Tanvald, Haman Jos. Hnidousy, Havránková M. Prostějov, Hladký Jar. Karvinná, Janisch Em. Žižkov, Machala T. Pržno, Mňačko Jos. Tišnov, Pytloun Fr. Bakov, Pytloun Vojislav Bakov, Rosypal V. Háj, Srb Jos. Bakov, Slechta P. Smolenice, Štěpán Al. Hostivař, Zdvihal Jan Týnec, Esp. klub Hradec Králové, Esp. klub Kladno.

Text 31. kromě toho zaslali: Adam K. Krč, Janisch Al. Žižkov, Šeffl Láďa Podlesí; text 32.: Görtlerová M. Praha, Novák Jos. Luka, Pulcman K. Bakov. Celkem nás tedy došlo obou textů po 21 překladech.

Z nejlepších překladů č. 31. vylosována byla práce p. Jos. Hamana z Hnidous u Kladna, z nejlepších překladů č. 32. práce p. Val. Rosypala z Háje ve Slezsku.

31.

La pratempaj homoj¹⁾ komprenis laŭdire la lingvon²⁾ de arboj kaj bestoj. Lupo kuris kaj diris al kamparano³⁾: „Estu tiel afabla⁴⁾, kamparano, kaŝu min, persekutas min ĉasistoj!“ Muŝo alportis sciigon al reĝido⁵⁾ kaj zumis en lian oreilon⁶⁾. Ĉevalo ekploris sub heroo. Carido kovris per sia vesto pluvmalsekajn⁷⁾ birdidojn en arbaro. Jen alflugas granda birdo, la patri-no de la birdidoj, kaj ekvidas, ke la birdoj estas kovritaj. Ĉi diris: „Kiu kovris miajn idojn?“

Se vi bezonos min en danĝero⁸), rememoru min⁹)!" Floro havas sian lingvon, ankaŭ¹⁰) turdo havas sian lingvon¹¹), sed homoj en tumulto de la vivo ne havas tempon por aŭskulti kaj lerni ilin.
(Laŭ J. Herben.)

32.

Matura¹) homo elspiras en unu horo²) 17—36 litrojn da karbonata oksido³) — laŭ tio, ĉu⁴) li dormas aŭ laboras. Infano elspiras en unu horo kompreneble malpli — proksimume 10 litrojn, tio estas preskaŭ ĝuste⁵) tiom, kiom da ĝi produktas brulanta kandelo dum unu horo. Sed petrollampo kreas ĝin tiom, kiom tri maturaj personoj. Flamingo de ĝaslumo rabas al ni eĉ pli da oksigeno ol kvin personoj. Jam el tio estas videbla⁶) la avantaĝo de la elektra lumo, kiu tute ne ŝanĝas konsiston de aero en la loĝejo.

Poznamky:

31.

1. též: prahomoj, originaj homoj
2. též: parolon
3. též: kampulo, kampisto
4. též: bonvola
5. též: princo. V pohádkách však princ=syn královský
6. též: zumis al li en orelon
7. zde zbytečná forma pluvmalsek i ĝ i t a j n nebo plumalsek i ĝ i t a j n
8. též: mizero, malfeliĉo
9. vzpomenouti si na něco nebo na někoho rememori ion aŭ iun, pri io aŭ pri iu
10. zde „i“ ve smyslu také (=ankaŭ), nikoli „ba i“ (=eĉ).
11. též: ankaŭ la turdo havas la sian.

32.

1. plenkreska homo, plenkreskulo, plenkreskinto
2. ĉiuhore, dum unu horo
3. kyselina uhličitá = acido karbonata; kysličník uhelnatý = karbonmonoksido; k. uhličitý = karbondioksido
4. nikoli „se“
5. nikoli „jus“, které má význam časový, všimněte si rozdílu — „jus“ a — „ĝuste“ v Zamenhofově větě: ĝuste pri tio mi ja jus parolis = právě o tom jsem přece zrovna mluvil. — „Ĝus“ není esp. slovo.
6. estas evidenta — tio evidentiĝas...
7. olupuje nás — rabas al ni, de ni. Olupuje pro nás = rabas por ni. La morto rabis al li la infanon (Zam.). Malĝojo rabas al li la feliĉon. (Zam.) Prirabi urbon, karavanon; tute dezertiĝita

kaj prirabita lando (Zam.); disrabi la ŝtatajn financojn (SAT).

33. TEXT K PŘEKLADU.

Přeložte a zašlete nám do konce května první odstavec článku „Slavní mužové českoslovenští a esperanto“ uveřejněného na první stránce tohoto čísla.

NAŠE SOUTĚŽ.

Sdělujeme se všemi účastníky naší soutěže z roku 1928, že porota složená z pp. H. K. Boušky, Dra Stan. Kamaryta a R. Hromady rozhodla o udělení cen takto:

1. cena 100 Kč: pí Barbora Hofmannová Praha za překlad „Li estis sentaĝulo“ (Jan Neruda).
2. cena 75 Kč: Ludvík Krysta, Český Těšín za překlad „Čertza miraklo“ (Helena Čapková).
3. cena 50 Kč: Pavel Rosa Bratislava za překlad „Lizo“ (Janko Jesenský).

Práce tyto budou v Progresu postupně uveřejněny a doufáme, že se budou těšiti zasloužené pozornosti všech našich čtenářů. Nerudovu povídku „Li estis sentaĝulo“ uveřejňujeme již v tomto čísle.

Děkujeme všem, kteří se účastnili, za spolupráci i trpělivost. Redakce.

Utilo de niaj ĝvidlibroj.

... La ĝvidlibro trege tentas min viziti vian landon. Kiel bela estas la naturo tie! La ĝvidfolio pri Praha estas al mi utila ankaŭ pro tio, ke ĝi klarigas la elparoladon de via nacilingvo, kiun en Japanujo nur tre malmultaj scias. Ekzemple tre multaj ne scias la elparoladon de la nomo de la mondfama muzikisto Dvořák...

(El letero de Rionosuke Kurosaŭa, estro de la Iluminprovejo ĉe la Tokia Elektra Kompanio.)

!! ĜIS NUN 194 ALIĜINTOJ !!
POR OLOMOUC

POR LOĜADO EN LUHAČOVICE

oni rekomendas vilaon

ČECHIE,

kies posedanto estas UEA-ano kaj ČAE-ano. Abonantoj de Progreso havas rabaton. Demandojn adresu: Vila Čechie, Luhačovice.

BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA XIX. URALSKÉ NÁM. 447.
NUMERO 45. - MAJO 1932.

LA 2. KOMITATA KUNVENO DE ĈAE

okazis merkrede la 13. Aprilo 1932 en Praha, kafejo Louvre. Ĉeestis: Herzigová, Hromada, Dr. Pitlík Staněk Fr., Staněk Mil., Sustr. Tarantíková, Sedláček; Janda, Slavík. Senkulpiĝis sin Votrubeč, leteron sendis Dr. Kamaryt. — Prezidis Dr. Pitlík, protokolis Tarantíková, — Daŭro de 20.45 ĝis 23.15 horo.

La kunsido rememoris la 15-an datrevenon de la morto de Dro. Zamenhof.

Propono de S-ro Baroch (transdonita de la ĝenerala kunveno) pri kursoj por kandidatoj de la esperanto-ekzamenoj estas sendita al Instituto, al kies kompetenteco ĝi rilatas.

Ĉar la Polica Direkcio insistas pri elekto de la ĝenerala sekretario, la kunsido elektas por tiu funkcio S-ron Jaroslav Sustr.

La raporto pri Agado de ĈAE estis sendita al 27 naciaj societoj organizitaj en K. R., kune kun invitiĵo al la kongreso de Olomouc, kun gvidfolio Praha kaj gvidfolio de Sokol-kongreso.

La definitiva programo de la kongreso en Olomouc estos starigita, post kiam LKK donos al ni pli precizajn informojn pri siaj 3 proponoj.

Decidite enĉizigi la nomon de ĈAE sur la memorblokon apud Esperanto-arbo en Olomouc kaj pagi por tio 150 Kč al LKK.

Decidite sendi inviton por ĉs. kongreso al diversaj ŝtataj aŭtoritatoj kaj al redakcioj.

Estis aprobita la Regularo de la Fondaĵo por subteni la kandidatojn de ŝtataj Esperanto-ekzamenoj, verkita de la prezidanto, kaj publikigota en Progreso.

S-ro Sustr sendis al Olomouc pakajon da ekspozicia materialo de ĈAE por laŭvola elekto de LKK.

Fino Saxl, ĉe metoda instruistino proponas sin por aranĝo de kursoj printempaj en ĈSR. Ne eble akcepti pro nefatiga jarsezono.

LA 3. KOMITATA KUNVENO DE ĈAE.

okazis marde la 3. Majo 1932 en Praha, kafejo Louvre. Ĉeestis Ginz, Herzigová, Hromada, Janda Jos., Dr. Pitlík, Sedláček, Slavík, Staněk, Fr., Staněk Mil., Sustr, Votrubeč. Senkulpiĝis sin Tarantíková, leterojn sendis Dr. Kamaryt kaj Skleněka. — Prezidis Dr. Pitlík, protoko-

lis Slavík. — Daŭro de 20,30 ĝis 23 horo. El la protokolo ni publikigas:

Kongreso en Olomouc.

Ni sendis oficialan inviton al ministerioj de komerco, instruado, fervojoj, de eksterlandaj aferoj, kaj al prezidio de la ministraro. — Al 54 kluboj en ĈSR ni sendis instigan leteron pri partopreno en la kongreso, pri subteno de Esperanto-arbo, pri speciala vagonaro Praha-Olomouc. — La promesitaj 8 flagoj al Olomouc estas forsenditaj. — Estis aprobita la teksto, kiun Dro Kamaryt rekomendas enĉizigi sur la memorbloko anstataŭ tiu de LKK. — Komuna kunsido de estraranoj de ĈAE kaj GEL okazos dimanĉe matene je la 8-a horo. — Programo por laborkunsidoj, verkita de Dro Kamaryt, estis post diskuto kompletigita. Ĉiu kongresano ricevos unu ekzempleron.

Propaganda afiŝo.

Al 54 kluboj ni dissendis cirkuleron kun informo, ke ni eldonos en la plej proksima tempo du specojn da propagandaj afiŝoj. Ili estos tre utila helpilo por niaj propagandistoj kaj precipe por la kluboj. Por ke ĉiu interesato povu utiligi tiun ĉi entreprenon de ĈAE, ni informas pli detale:

Propaganda afiŝo estos dukolora, kun bela bildo de terĝlobo kaj stelo kaj surskribo: „Esperanto, internacia helpa lingvo. Informace o možnostech praktického upotřebení i o stavu hnutí. podají Svaz československých esperantistů v Praze nebo...“ (loko por titolo kaj adreso de la loka institucio) aŭ slovake: „Informácie o možnostiach praktického upotrebenia aj o dnešnom stave hnutia podajú Sväz československých esperantistov v Prahe alebo...“

Granda afiŝo 30×94 cm kostos Kč 1.90

Malgranda afiŝo 30×45 cm kostos Kč 1.70.

Speciale la malgrandaj afiŝoj presitaj sur kartona papero estas destinitaj por pendigi (en aŭ sen kadro) en ĉiuspecaj publikaj ejoj: oficejoj, vendejoj, hoteloj, haloj, restoracioj, legejoj, atendejoj kuracistaj k. s. Laŭ sperto oni facile atingas permeson elpendigi tian plaĉan afiŝon, kiu poste propagandas sen nia plua zorgo.

Se vi mendos la afiŝojn antaŭ la presigo, do tu ĵ, vi pagos sole Kč 1.70 (granda) aŭ Kč

1.50 por ekzemplero, kondiĉe, ke vi mendos almenaŭ 10 ekz. La afranko (10proc.) estas pagota krome.

Poŝtkarto kun landkarto de ĈSR.

Laŭ propono de F-ino Supichová ĈAE intencas eldoni poŝtkarton kun skema landkarto de la respubliko kaj mallonga klariga teksto. La landkarto troviĝos sur maldekstra duono de la adresflanko, la dorsa flanko estos, plene libera por korespondo. Tre utila kaj tre dezirata de niaj korespondemuloj al eksterlando. Al la antaŭmendantoj ni liveros 100 ekz. por Kč 15.—

Gvidfolio Praha.

La manuskripto de S-ro Bouška estas jam preta kaj iras en la presejon. La rimarkojn kaj proponojn liveris Ginz, Sustr, Hromada.

Membraro.

Laŭ informo de nia kasisto S-ro Skleněka venis ĝis la 30. Aprilo kotizoj por 1932 de 254 membroj. Por egali al la jaro 1931 sufiĉas 75 plujaj membroj. Tamen ni deziras, ke la rezulto estu ankoraŭ pli bona. La kasisto petas:

- 1) ne prokrastu vian aliĝon,
- 2) varbu almenaŭ unu novan membron aŭ realigu unu malnovan,
- 3) klubaj kasistoj transdonu tuj la liston de la enkasigitaj ĈAE-kotizoj,
- 4) varbu en la klubaj kunvenoj por amasa aliĝo al ĈAE.

Imitindaj ekzemploj!

En Mladá Boleslav.

La nove konstituiĝinta klubo en Mladá Boleslav aliĝis al Asocio samtempe 10 siajn membrojn.

En Bratislava.

Ĉiu membro de la Esperanto-Klubo en Bratislava paginta dum 1932 regule la kluban kotizon fariĝos por 1933 membro de unu nacia centro (ĈAE aŭ GEL, laŭ sia elekto). La kotizon pagos la klubo mem.

Tiel decidis la komitato de la Esperanto-Klubo en sia kunveno la 20. Aprilo. La letero informanta nin pri tio diras i. a.: „Ni esperas, ke ni tiel kontentige solvis la organizan demandon.“

Efektive tia ago estas solvo la plej bona.

Fervojistaj insignoj.

Laŭ nia deziro (vidu p. 12.) I. C. K. enketis ĉe la Naciaj kaj Fakaj Societoj pri permesoj porti esp. insignon dum deĵorado. Ĝis nun ni ricevis informojn pri tri landoj:

Estonio:

„194. Decido de la registaro de la respubliko de la 18-a de Februaro 1932. Permesi al la ŝtataj oficistoj, posedantaj esperanton, porti sur uniformo Esperanto-insignon surbruste maldekstraflanke. Bazo: § 12, de la dekreto pri la vestprovizo de la ŝtataj oficistoj (R. T. 63-1930).“

Nederlando:

Tie ĉi la direkcio fervoja malpermesas la portadon de insignoj kiuj ajn. Tamen laŭ reskripto nro 220 de la 19. Marto 1931, la portado de Esperanto-insigno „La verda stelo“ estas permesita. Tiun ĉi permeson uzas 30 fervojistoj parolantaj esperanton.

Finlando:

„Laŭ sciigo de la ĉefdirektiro de la fervoja administracio Prof. J. Castrera, la fervojistoj scipovantaj esperanton, estas rajtigigitaj porti dum oficado la internacian signon (verdan kvinpintan steleton)“

Diversa:

Ni gratulis al nia prezidanto okaze de naskiĝo de lia filo Paŭlo Stanislavo. La estonta prezidanto aliĝis kiel subtenanta membro. — ICK proponis, ke ni aĉetu 300 broŝurojn Paco konferenco en Praha. Instituto proponas ĉefajn ŝlosilojn 100 ekz. por 40 Kč. Prokrastita ĝis elĉerpiĝo de niaj provizoj. — Ricevon de nia raporto pri agado en 1931 konfirmis kaj sian raporton al ni sendis Brita kaj Nederlanda Esperanto-Asocioj. — Instituto informas, ke ili principe konsentas aranĝi en vintraj monatoj 1932 la deziratan kurson por kandidatoj de esperanto-ekzamenoj. Alvoko al esp. de Praha estos publikigita en Bulteno. — Instituto eldonos informan flugfolion pri la ekzamenoj, kiu kostos 2 Kč. — S-ro Echnert, kiu lerte sukcesis kunigi grandan nombron da junaj lernantoj de la kurso en Sloviĉko estos petata gvidi ĉe Asocio Junularan Komisionon.

MEMBRA KOTIZO DE ĈAE

Kč 16.—

(subtenantoj Kč 50.—, dumvivaj Kč 500.—).

ĈLENSKÁ PREMIE :

- S = Svaz Národů o Esperantu 48 stran
- C = Collinson „Esperanto a jeho kritikové“ 24 stran
- V = Jak byl rozluštěn problém mezinárodního jazyka pro obchod a styk s cizinou. 44 stran
- Poj = 20 propagačních letáků „Pojítka“
- P = Paco per lernejo 32 stran
- D = Devot de la homo 164 stran
- Z = 10 pohlednic s obrazem Dra Zamenhova.

Sendu aliĝan poŝtkarton

al Otto Skleněka, kasisto de ĈAE, Hradec Král. 628a
Ceteran korespondajon por ĈAE adresu al
Praha XIX. Uralské, 447.

EN 1926

en kongreso de Bratislava oni deklaris:

Por pliproksimigi la ĉeĥoslovakian esperantistaron al la organiza idealo, la III. ĉeĥoslovaka kongreso denove akcentas, ke ĉiu esperantisto en ĈSR devas esti membro de unu el la propagandaj centroj. La kongreso solene deklaras, ke esperantisto estas por ni persono, kiu ne sole scias kaj uzas la lingvon esperanto, sed ankaŭ **helpas al la plua progresado de nia afero per aktiva kunlaborado**, aŭ almenaŭ per materiala subteno, **estante membro de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista** aŭ de Germana Ligo Esperantista.

Ĝis la tempo, kiam montriĝos ebla alia solvo, ekzemple kunfandiĝo de CAE kaj GEL, la hungarlingvaj esperantistoj en ĈSR aliĝu al CAE kun ŝanĝita nomo: Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista.

Tiu ĉi deziresprimo pri landa organizo, proponita de prof. Vlad. Jukl el Bratislava, estis akceptita post detala diskuto per ĉiuj voĉoj kontraŭ unu.

EN 1928

en kongreso de Teplice:

Senŝanĝe kaj unuanime la tuta kongreso en Teplice-Sanov decidis laŭ propono de prof. Ing. Scholze renovigi la supran rezolucion de Bratislava.

MOVADO EN ĈSR.

Ŝtataj ekzamenoj.

Ŝtatan ekzamenon por instruado de esperanto en la komunumaj kaj burĝaj lernejoj de ĈSR faris ĉe la komisiono en Praha la 7. IV. monaĥino M. R. PŘÁDOVÁ, instruistino de la instituto „Zábojský“ en Levoča, kun bona rezulto.
Dr. A. P.

En Bratislava ĉe ĉeĥoslovaka komisiono por popolaj kaj burĝaj lernejoj faris ekzamenon en printempa termino 1932 s-roj A. Macek, universitata studento, kaj J. Novosad, ambaŭ el Bratislava.

Instruistoj.

Fr-ino Margit Feldmanová, instruistino en la burĝa lernejo en Kežmarok, prelegis pri esperanto la 9-an de Marto en konferenco de instruistoj de ŝia lernejo kaj 14-an de aprilo en konferenco de instruistoj el la tuta distrikto.

Ambaŭ prelegoj elvokis vigan diskuton kaj sinceran intereson.

Radio Brno.

Dimanĉe la 17. Aprilo S-ino Strejčková parolis je la 18. h. 50 min. en stacio Brno esperante pri la IX. Sokola kongreso en Praha.

Sokola kongreso.

La Esperantista Klubo aranĝas marde la 5. Julio specialan kunvenon en sia ejo por kunveni kun la esperantistaj partoprenantoj de la Sokola kongreso.

Praha. Esperantista Klubo kunvenas ĉiun vendredon en aparta ĉambro de kafejo Louvre. Samideanoj de Praha estas kore invitataj partopreni en la kunvenoj. Pri la programoj de la kunvenoj ni prezentos koncizan raporton venonte.

Praha. Laborista grupo esperantista aranĝas ĉiun unuan mardon en monato membran kunvenon en Odborový dům. Ĉeestas eĉ 70 membroj kaj gastoj.

Praha. Klubo de katolikaj esperantistoj kunvenas ĉiujauĉe de la 19 ĝis 21 horo en reforma restoracio, strato Ostrovní 18.— Kurson por 13 komencantoj gvidis F-ino Dandová. Nun okazas kurso por progresintoj.

Brno. Esperantista Klubo havis sian jarkunvenon la 20. Marto en hotelo Passage. Vigla diskuto. Starigita estis informa servo 4 membra por zorgi pri esp. informoj en la loka gazetaro. Denove estis decidite peti la urbestaron, ke ĝi nomu iun straton Zamenhofa aŭ Esperanta. Nova komitato: S-inoj Strejčková, Adamcová, S-roj Baďura, Vondroušek, Hoffner, R. Nečas, Poláček, Topič, Strejček kaj Sonnenfeld.

Olomouc. En la ĝenerala kunveno de Esperanto-societo la 14. 4. estis elektita la ĵena estraro: prez. Kudela, vicpr. Nežil, sekr. Pittner, kas. Mrázková, bibl. Mastný, plie Golla kaj Kuba. La societo havas 416 librojn en la biblioteko kaj elspezis dum 1931 Kč 800.— por libroj kaj gazetoj. La kunvenon ĉeestis ankaŭ gastoj el Prostějov. Kursoj estis 6, el la kursanoj ĝis nun nur 3 aliĝis al la societo.
ak

Plzeň. Kurso en Hus-Popola Universitato gvidata de A. Kasal, instruisto dum printempo 1932. Partoprenis 25 p. Por komenci de la kurso prelegis pri esp-o s-ro Ing. Novák.

Hradec Králové. En seminario S-o Jan Filip gvidas kurson por 24 seminarianoj.

Kolín. En la ĝenerala kunveno la 12. 2., kiun partoprenis 13 p. estis elektitaj: Ferd. Bendl

prez., Jos. Drahovzal vicprez.; Jan Václav sek., Stan. Hermoch kas. En 1931 la klubo havis 25 membrojn kaj okazigis 26 kunvenojn ĉiun duan kaj kvaran vendredon en klubejo de hofelo „Lidový dům“. Gastoj estas kore akceptataj. Adreso: Esp. Kl., prez. Ferd. Bendl, direktoro de advokata oficejo, Kolín, Kouřimská, 9.

Topolčany. Kurson por 10 p. laŭ Kurso lernolibro de Privat gvidas ĉi tie de 11. 4. S-ro Emil Tapa y, lernejestro en Velké Uherce.

Nýdek. Kurso por komencantoj depost januaro 1932; instruas A. Kajfosz 21 p.

Nový Jičín. Kurso por 15 komencantoj depost 23-a de februaro; instruas s-ro Josef Krumpolc el Senov. La kurso estis malfermita per prelego de pastro Pokorný pri nia movado.

Tuřany. Printempa kurso por 23 komencantoj gvidata de instruisto s-ro Jar. Hoffner.

Vitkovice. Esperantista klubo en Mor. Ostrava-Vitkovice okazigis la 24-an de aprilo 1932 en ejo de Odborový dům en Vitkovice ĝeneralan kunvenon. Estis elektita jena komitato: Prezidanto: Vlad. Slaný, (I. vicprez. Jos. Sendzimír, II. vicprez. Marie Havlásková). Sekretario: Ot. Gadula, (vicsekr. Lad. Seděnka). Kasisto: Jar. Vichnar, (vic. Karel Martínková). Arĥivisto: Jos. Rucký, (vic. Karel Majtner). Revizoroj: Jar. Slaný — Jos. Rucký. Propagando: Jos. Sendzimír, Ed. Sedláček, Jos. Wojewoda. Samokaze estis aranĝita „Esperanto-ekspozicio“.

Frýdek — Místek. Jarkunveno de la Klubo 25. II. reelektis kiel prezidanton Fr. Golasowski.

Karvinná. La 21 de marto okazis la lasta leciono de la 3-monata esperanto-kurso, organizita de la Memeduka Rondeto de Macierz Szkolna en Karwina. Aliĝis 55 personoj, finis 38. Meza nombro de partoprenintoj estis 47. La kurson gvidis s-ro Rud. Z. Kobiela, konsuleja oficisto. — La 4. de aprilo komencis nova kurso de esperanto por progresantoj, kiun gvidas s-ro Rud. Kobiela. Aliĝis 31 personoj. — Kuragigita per la sukcesplena publika diskuto pri lingvo internacia, la pola urba kleriga komisiono organizas novan kurson de esperanto por la komencantoj. La kurson gvidos s-ro pastro K. Maultz. Aliĝis jam pli ol 30 personoj. rzk

Karvinná. Laborkunsido de Regiona ligo sillezia okazis ĉi tie la 10. 4. okaze de la finiĝo de la kurso. Ĉeestis 105 p. el 21 lokoj, el Karvinná mem 45 p., plejparte kursanoj. Al la kursanoj S-ro Kobiela rekomendis aliĝon al regiona ligo kaj al UEA. La unuan premion en konkurso traduka por kursanoj ricevis s-roj Wlosok kaj Urbaniec (libroj, vojaĝo al Olomouc). — Poste S-ro Kobiela parolis pri Pola kori-

doro, Gdynia kaj Balta maro. — 10 novaj membroj aliĝis al REL. — Se aliĝos 40 p. oni veturos al la kongreso de Olomouc per aŭtobuso. — Oni rekomendis propagandi per leterpaperoj kaj kovertoj kun nomo de REL. hl.

Uherský Brod. En gimnazio estas en la jaro 1931-32 kurso de esperanto por studentoj, kiun gvidas prof. de tiu lernejo Vlad. Havránek. Partoprenas ĝin 63 studentoj.

ĈEĤOSLOVAKA GAZETARO KAJ ESPERANTO.

„La vera stato de malarmado“ de Georg Agricola en ĝeneva Esperanto aperis en traduko de A. Ráž en **Právo Lidu** 16. IV.

Národní Politika alportis la 15. IV. longan informan artikolon „Esperanto en lernejoj“ de J. Šupichová.

Esperanto kaj dialektiko, bona studo de Antar en **Slunce** nro 1-1932, daŭrigata de unua leciono de esperanto-kurso tie represota.

Per „Esperanto presservo - K. F.“ estas subskribita artikolo „Sporto en la Socialista korpeduka internacio laborista“, aperinta la 24. IV. en **Právo Lidu**.

Pri la signifo kaj disvastiĝo de nia lingvo skribas la usona ĉeĥa ĵurnalo **New-Yorské listy** la 7. IV.

Esperantan rubrikon gvidatan de Fr. Boreš ni vidis denove en **Jitro** nro 8/1932.

Lidové noviny Brno 26. IV. sciigas, ke oni fraktas pri japana traduko de la verko de Welzl: **Tridek jaroj en la ora nordo**. La traduko estos farita laŭ la esperanta eldono de la verko.

Novan lecionon de esperanta kurso de J. Šupichová ni vidis en **Slovíčko** 24. IV.

Longa artikolo en de O. Vočadlo **Přítomnost**, No 14. pri la nova projekto Basic English pruvas, ke la aŭtoro ne studis funde la problemon de internacia lingvo. Li estos multon lerninta en tiu rilato post lego de respondo de dro Stan. Kamaryt, kiun reprenis la sama revuo en no 16. la 20. IV.

Malý čtenář parolas en nro 17/1932 pri la esperanta teksto sur la poŝtkartoj de Liechtenstein kaj atentigas erare, ke estas la unua apero de esperanto sur oficialaj poŝtaĵoj. La aŭtorino de la artikolo malatentis la fakton, ke multaj poŝtmarkoj kaj ĉiuj poŝtaĵoj sovetuniaj destinitaj por eksterlando portas esperantajn surskribojn. Ankaŭ la oficialaj poŝtkartoj de Danzig havis tekston en esperanto.

La XIII. ĝener. kunveno. Korekto: Sur paĝo 45. en la alineo 5. (Elektoj) enmetu en la linion 26 la nomon dr. Piřílík enfalintan pro presista eraro.